

LUKIANO

JUĜO PRI LA DIINOJ

el la helena tradukis
GERRIT BERVELING

Juĝo pri la Diinoj

Θεῶν κρίσις

(1)

Zeŭso: Hermes, prenu ĉi pomon kaj iru al Frigio, al la filo de Priamo, la bovisto — li paŝtas sur Gargaro, en la Ida-montaro — kaj diru al li: Vin, Pariso, ordonas Zeŭso, ĉar vi belas kaj saĝas pri amaferoj, ke vi juĝu pri la Diinoj, kiu el ili estas la plej bela. La venkintino ricevu ĉi pomon premie por la konkurso. (*Al la Diinoj*): Kaj nun estas tempo por vi, ke vi iru al la juĝonto. Mi ja rifuzas juĝi vin, ĉar ĉiujn vin mi amas same, kaj se eblus, volonte ĉiujn mi vidus venkaj. Krome se al unu mi donus la premion de plejbelo, neeviteble mi perdus la favoron de la plimulto. Tial mi ne taŭgas por juĝi vin, sed tiu juna Frigo, al kiu vi iros, estas de reĝa deveno kaj parenca al nia Ganimedo; krome li estas sincera kaj simpla montano, kaj neniu povus envii lin pro tia ĉi spektaklo.

(2)

Afrodita:¹ Ho Zeŭso, eĉ se Momon² mem vi elektus por juĝonto, kun konfido mi irus al lia inspektado — kion li ja mo-mokus en mi? Ankaŭ la ceteraj ja devas esti kontentaj pri la ulo.

1 Afrodita estis la patrino de Eneo; Anĥizo, ŝia amanto, Troja princo, estis lia patro.

2 Momo: Dio de la mokado kaj grumblado.

Hera: Ni neniel timas, ho Afrodita, eĉ ne se via Areso mem ricevus la komision. Ni akceptas ĉi Parison, kiu ajn li estu.

Zeŭso: Ĉu same opinias vi, filino? Kion vi diras? Ĉu vi forturniĝas kaj ruĝiĝas? Estas ja propre al vi, virgulinoj, hontemi pri tiaj aferoj. Tamen, vi ja konsentas. Iru do, kaj ne ekkoleru la juĝiston, se vi estos venkitaj. Ne faru malbonon al la junulo. Ne estas ja eble ke ĉiuj vi belas samgrade.

(3)

Hermeso: Ni do rekte iru al Frigio; mi montros la vojon; vi min sekvu ne lante, sed plenkuraĝe. Parison mi konas: li estas bela junulo kaj ĉiel sperta pri amaĵoj — nepre la plej taŭga juĝonto. Li ne mise kapablus...

Afrodita: Ĉio ĉi, kion vi diras, bonegas, kaj min favoras, ke la juĝisto estas justa. Ĉu li estas senedzina aŭ ĉu vivas virino kun li?

Hermeso: Ne tute senedzina, Afrodita.

Afrodita: Kion vi celas?

Hermeso: Ŝajnas, ke vivas kun li virino el la Ida-montaro, certe sufiĉe bona, sed iom senkultura kaj montareca; sed ŝajne li ne tre interesiĝas pri ŝi. Sed kial vi tion demandas?

Afrodita: Ial mi demandis.

(4)

Atena: Hej vi, vi misuzas vian funkcion, parolante tiom kun ŝi private!

Hermeso: Tute ne, Atena, ne estis io grava nek kontraŭ vi; sed ŝi informiĝis ĉu Pariso estas senedzina.

Atena: Kial ŝi informiĝis pri tio?

Hermeso: Mi ne scias. Sed ŝi diras, ke ial tial ŝi ĝin demandis, ne kun certa celo.

Atena: Kio do? Kaj ĉu li senedzinas?

Hermeso: Ŝajne ne.

Atena: Kaj plue, ĉu li strebas al sukcesoj militistaj kaj ĉu li amas famiĝi, aŭ ĉu li nur estas paŝtisto?

Hermeso: Mi tion ne povas respondi kun certo, sed neeviteble — ĉar li estas juna — li ja devas deziri ankaŭ tion kaj sopiri fariĝi la unua en bataloj.

Afrodita: Vi vidas, mi ne plendas nek riproĉas vin ke vi private parolas kun ŝi; tio ja konvenas al plendulinoj, ne al Afrodita.

Hermeso: Ŝi demandis min preskaŭ la samon; do ne estu kolera, nek kredu ke okazas maljustaĵo al vi, se ankaŭ al ŝi mi respondas senpere.

(5)

Sed dumparole ni jam delonge pasis la stelojn en nia flugo kaj jam estas preskaŭ super Frigio. La Idan mi jam vidas kaj, klare, tutan Gargaron, kaj se mi ne eraras, ankaŭ nian juĝiston Pariso mem.

Hera: Kie li estas? Mi ne jam vidas lin.

Hermeso: Tie, Hera, rigardu maldekstren. Ne ĉe la montokresto, sed flanke, kie estas la groto, kie vi vidas ankaŭ la gregon.

Hera: Sed mi ne vidas gregon.

Hermeso: Kion vi diras? Ĉu vi ne vidas bovetojn, jen laŭ mia fingro, aperantaj meze de la rokoj, kaj iun kure descendantan la klifojn, kun paŝtista bastono en la mano, provante malhelpi ke la grego antaŭ li disiĝas?

Hera: Jes nun mi vidas, se almenaŭ estas li.

Hermeso: Certe, estas li. Ĉar nun ni proksimas, ni surteriĝu, se vi konsentas, kaj piediru, por ne konfuzi lin, subite alflugante de supre.

Hera: Vi pravas; tiel ni faru. — Nun ke ni descendis, Afrodita, estas tempo, ke vi antaŭiru kaj montru al ni la vojon. Verŝajne vi ja konas la ĉirkaŭaĵon, ĉar — laŭdire — plurfoje vi descendis al Anĥizo.

Afrodita: Ne serioze, Hera, tiuj ŝercoj min trafas.

(6)

Hermeso: Sed mi vojmontros jam al vi. Mem mi estis iom da tempo sur Ida, dum Zeŭso estis enamiĝinta pri la Frigia knabo,³ kaj ofte mi venis ĉi tien, sendite por gvati la junulon. Kaj fakte, kiam li estis en la aglo, mi fluge akompanis lin kaj helpis lin levi la belulon, kaj se mi bone memoras, li forrabis lin ĝuste de ĉi tiu roko. Li estis fajfanta por sia grego, Zeŭso alflugis de malantaŭe kaj tre delikate lin ekprenis en siaj ungegoj, tenis per la beko la tiaron sur lia kapo, kaj forportis la knabon, kiu estis terurita kaj algapis lin turninte la nukon. Mi eklevis tiam la fluton, ĉar en sia ektimo li ĝin faligis — sed jen estas nia juĝonto; ni alparolu lin.

(7) Saluton, bovisto.

Pariso: Jes, same al vi, junulo. Kiu vi estas, ke vi venas al mi? Kaj kiuj estas ĉi virinoj, kiujn vi kunvenigas kun vi? Ili ja ne kutimas vagi tra la montaro — tiel belaj ili estas!

Hermeso: Sed, Pariso, ili ne estas virinoj. Vi vidas Heran kaj Atenan kaj Afroditan. Kaj min, Hermeson, sendis Zeŭso. — Sed kial vi tremas kaj paliĝas? Ne timu! Ne estas terure. Li petas vin fariĝi juĝanto pri ilia beleco. Li diras: “Ĉar vi mem estas bela kaj saĝa en amaferoj, mi transdonas al vi la decidon.” Kaj la premion de la konkurso vi konas, se vi legas la tekston sur la pomo.

Pariso: Nu, mi vidu kion ĝi volas. Ĝi diras: “La bela min havu.” Sed kiel mi, ho mastro Hermeso, kiel mi, kiel mortemulo kaj simpla kampulo kapablus fariĝi juĝisto pri tiel neimagebla spektaklo, tro sublimuma por bovisto? Prijuĝi tiaĵojn ja pli decas al luksemaj kaj urbeskaj viroj. Kiom min koncernas, mi eble senprobleme povus juĝi inter du kaprinoj, kiu estas la plej bela, aŭ inter du bovidoj — laŭ mia fakeco;

3 Ganimedo; vidu en la komenco: Zeŭso metamorfoziĝis en aglon por forkapti lin.

(8) sed tiuj Diinoj ĉiuj same belas kaj mi ne scius, kiel viro povus transigi la rigardon de unu al la alia; ĉar ĝi ne rapide foriĝas, sed kien ajn oni direktas la okulojn, tion ili firme ekkaptas kaj laŭdas; kaj se ili transiras al io alia, ili konstatas ke ankaŭ tio belas kaj restas tie, kaj ili komplete obsediĝas de tio kio estas tuj antaŭ ili. Entute, ilia beleco min komplete ensorĉas kaj venkis kaj mi bedaŭras, se la pomon mi decidus per la tuta korpo, kiel Argoso.⁴ Mi kredas ke mi belege juĝus, se la pomon mi decidus al ĉiuj. — Parenteze: unu el ili estas hazarde la fratino kaj edzino de Zeŭso, kaj la du aliaj liaj filinoj! Kiel do ankaŭ tiurilate eblus, ke la juĝo estus sendanĝera?

Hermeso: Mi ne scias; sed estas neeble eskapi el tio, kion ordonis Zeŭso.

(9)

Pariso: Unu aferon, Hermeso! Konvinku ilin, ke ili ne koleru al mi, tiuj du kiuj estos venkitaj, sed ili kredu sole ke mia rigardo eraris.

Hermeso: Tiel ili diras, ke ili faros. Sed nun tempo estas, ke vi faru vian juĝon.

Pariso: Mi provos; kion alian oni povus fari? Sed unue tion mi volus scii, ĉu sufiĉas rigardi ilin tiaj, kiaj ili nun estas, aŭ ĉu mi petu ilin senvestiĝi por pli profunda pritaksado?

Hermeso: Tio estus via afero, kiel juĝisto. Vi ordonu laŭ via deziro.

Pariso: Laŭ mia deziro? Nudaj mi volas ilin vidi.

Hermeso: Senvestiĝu, ho vi Diinoj. Do inspektu ilin, vi! Mi forturniĝis.

(10)

Afrodita: Bele, Pariso. Mi unua senvestiĝos, por ke vi sciiĝu, ke mi ne nur la brakojn havas blankaj, kaj ke mi ne fieriĉas pri miaj 'bovin-okuloj',⁵ sed ke mi estas egale tutkorpe bela.

Atena: Vi ne lasu ŝin senvestiĝi, Pariso, antaŭ ol sian zonon ŝi estos flanken metinta, ĉar ŝi estas sorĉistino; ŝi povus ensorĉi vin per ĝi. Kaj fakte ŝi devus aperi antaŭ vi ne tiom beligita aŭ multkolora ornamita, kvazaŭ serioze ŝi estus hetajro, sed tute nuda ŝi devus montri sian belon.

Pariso: Ili pravas pri la zono, do formetu ĝin.

Afrodita: Kial do vi, Atena, ne same formetas la kaskon por montri la nudan kapon, anstataŭ skui la plumojn por timigi la juĝiston? Aŭ ĉu vi timas, ke oni kritikos vin pro la verda nuanco de viaj okuloj, se rigardata sen timigo?

Atena: Jen por vi la kasko estas forigita.

Afrodita: Jen por vi la zono.

Hera: Nu, ni senvestiĝu.

4 PIV Arguso.

5 Afrodita mokas pri Hera, kiun Homero ofte nomas blank-braka kaj bovin-okula.

(11)

Pariso: Ho Zeŭso, miraklisto! Kia vidaĵo! Kia belo! Kia ĝojo! Kia estas la virgulino! Kiel reĝece kaj impone tiu ĉi elradias, kiel vere inda je Zeŭso! Kaj ĉi tiu rigardas tiel dolĉe kaj alloge, kaj kiel konvinke ŝi ridas! — Sed mi jam sufiĉe havas da tia bonsento! Se vi permesas, ĉiujn vin mi ŝatus ekzameni private, ĉar nun mi plene konfuziĝas kaj ne scias, kien rigardi; miaj okuloj estas tirataj ĉiudirekte.

Afrodita: Tiel ni faru.

Pariso: Do vi du foriru; sed vi, Hera, vi restu.

Hera: Mi restos do, kaj kiam vi inspektos min atentege, vi krome konsideru, ĉu plaĉas al vi la donoj, kiujn mi prezentas por voto favora. Ĉar se min, Pariso, vi juĝos la plej bela, vi estos reganto de tuta Azio.

Pariso: Ne surbaze de donacoj mi juĝos. Sed foriru vi; mi faros ja laŭ mia konscienco.

(12) Atena, vi alproksimiĝu.

Atena: Mi staras nun apud vi, kaj se, Pariso, vi juĝos min la bela, vi neniam forlasos batalejon venkita, sed ĉiam venkos. Mi ja faros vin soldato ĉiam venkanta.

Pariso: Neniom, Atena, mi bezonas militon aŭ batalon. Ĉar, kiel vi vidas, nuntempe paco regas Frigion kaj Lidion kaj la tuta regiono de mia patro estas senmilita. Sed kuraĝu: vi ne maljuste traktiĝos, eĉ se ne laŭdonace mi verdiktos. Sed nun revestu vin kaj surmetu la kaskon; mi ja vidis sufiĉe. Estas tempo, ke aperu Afrodita.

(13)

Afrodita: Jen ĉi tie mi — tute apud vi! Ekzamenu min detale, nenion preterante, sed atentante pri ĉiuj eroj. Kaj se vi deziras, belulo, do ankaŭ tion ĉi ankoraŭ aŭdu de mi: delonge mi ja jam konstatis, ke vi junas kaj vi estas tiel bela, kiel mi ne sciis ke estas unu el la knaboj, kiujn nutras Frigio. Mi gratulas vian belon, sed mi malŝatas ke — anstataŭ forlasi tiujn ĉi rokojn kaj ŝtonegojn kaj loĝi en urbo — vi malŝparas vian belecon en dezertejo. Kian ĝojon povos doni al vi ĉi montoj? Kian profiton havas la bonvinoj de via belo? Decus ke vi jam estus edzo — ne je kampulino, sovaĝulino, kiaj estas la virinoj en la Ida-montaro, sed je iu el Helaso — el Argolando aŭ el Korinto aŭ ... Spartana, kiel Helena, juna kaj bela kaj neniel malplia ol mi mem, kaj — kio plej gravas — amorema. Ĉar se ŝi vin eĉ nur ekvidus, mi bone scias, ke tuj ĉion ŝi forlasos kaj transdonos sin al vi kaj sekvos vin kaj ekloĝos kun vi. Kiel ajn, ankaŭ vi certe jam aŭdis pri ŝi.

Pariso: Neniom, Afrodita; sed volonte nun mi aŭdos vin plu paroli pri ŝi.

(14)

Afrodita: Ŝi estas la filino de tiu belega Leda, kiun surflugis Zeŭso, fariĝinte cigno.

Pariso: Kia ŝi estas laŭaspekte?

Afrodita: Blanka, kiel estas atendeble ĉe filino de cigno, kaj delikata, ĉar ŝi estis nutrita en ovoŝelo, multe gimnastikas kaj atletikas, kaj vere tiom svatata, ke eĉ vera milito okazis pro ŝi, kiam Tezeo forkaptis ŝin, ankoraŭ junulinon. Sed ho kiam ŝi adoltiĝis, ĉiuj plej gravaj el la Aĥajanoj kolektiĝis por svatiĝi al ŝi, sed Menelao, el la familio de Pelopso, estis elektita. Se vi volas, mi aranĝos por vi la nupton.

Pariso: Kion vi diras? Kun virino jam nuptita?

Afrodita: Vi estas juna kaj kampulo, sed mi scias, kiel decas aranĝi tiajn aferojn.

Pariso: Kiel? Mi ŝatus scii tion, ankaŭ persone!

(15)

Afrodita: Vi do iros eksterlanden kun la preteksto viziti Grekujon, kaj kiam vi alvenos en Sparton, vidos vin Helena. Depost tiam estos mia tasko, ke ŝi enamiĝos je vi kaj vin sekvos.

Pariso: Ĝuste tio ŝajnas al mi nekredebla, ke ŝi dezirus forlasi la edzon kaj fornavigi kun barbaro, kun fremdulo.

Afrodita: Pri tio vi havu kuraĝon. Mi ja havas du belajn knabojn, Deziron kaj Amon. Ambaŭ tiujn mi donos al vi por gvidi vian vojaĝon. Amo komplete eniros en ŝian koron kaj devigos la virinon, sopiri je vi, kaj Deziro elverŝiĝos sur vin mem kaj faros vin, kio li mem estas, dezirinda kaj ĉarma. Ankaŭ mi mem ĉeestos kaj mi petos la Graciojn akompani min. Kaj tiel ĉiuj kune ni konvinkos ŝin.

Pariso: Kiel tio ĉi evoluos, necertas, Afrodita; sed kiel ajn, mi jam enamiĝis je Helena kaj ne scias, kiel, sed mi jam vidas ŝin, kaj tuj mi velveturas al Helaso kaj Sparton mi vizitos kaj mi jam returniĝis kune kun la virino! — ho kiel ĉagrene, ke ĉion ĉi mi ne jam plenumis!

(16)

Afrodita: Ne enamiĝu, Pariso, antaŭ ol vi respondos pri la juĝo al mi, la svatiĝintino kaj kondukantino de via novedzino. Nur decus ja, se tie ankaŭ mi ĉeestus kiel venkintino, kaj ke mi kuncelebru samtempe vian nupton kaj mian venkon. Ĉio ĉi estas en via povo — aĉetu per tiu ĉi pomo amon, belon kaj nupton.

Pariso: Mi timas, ke post la juĝo vi forviŝos min el via menso.

Afrodita: Ĉu vi do volas, ke mi ĵuru?

Pariso: Tute ne! Sed nur ree promesu!

Afrodita: Mi promesas, ke al vi mi donos Helenan kiel edzinon, kaj ke ŝi sekvos vin kaj venos al la viaj en Trojo; kaj mi mem ĉeestos tie por ĉion aranĝi.

Pariso: Kaj ĉu vi kunportos kun vi Amon kaj Deziron kaj la Graciojn?

Afrodita: Ne timu; ankaŭ Sopiron kaj Nupton mi kunprenos kun mi.

Pariso: Nu, ĉu je tiaj kondiĉoj mi ne donu al vi la pomon? Jen prenu ĝin tiakondiĉe!

Enkomputiligita de Efthimios Mavrogeorgiadis kaj
korektita de la tradukinto en oktobro 2005.

Distribuata pere de www.esperanto.gr.